ISSN 2072-5825

# Espero Katolika



Numero 7-9/2016

Julio-Septembro 2016

**JARKOLEKTO 112 - N. 1140-1142 - Julio/Septembro 2016**
*Finpresita la 12.09.16* — Finito di stampare il 12.09.16

**Sur la kovrilo:** *Grupo de la partoprenantoj en la IKUE-kongreso 2016 staras sub la tri krucoj, je la pinto de la Kalvaria Monto en Nitra, Slovakio (v. p. 41).*

## ENHAVO

**65-a PASTRIĜDATREVENO DE BENEDIKTO LA 16-a**
Francisko: "de li, multe da forto" 35

**LA PAPO EN POLLANDO (27-31/07/2016)**
okaze de la Monda Junulara Tago 36

**FORPASIS KARDINALO MACHARSKI** 37

**ALVOKO AL PACO – Asizo 2016**
500 religiaj estroj preĝis en la urbo de sankta Francisko 38

**EL RADIO VATIKANA**
40-jariĝis la E-elsendo 39
Pastro Federico Lombardi forlasis direktoradon 40

**ROMA KURIO: NOVAJ ADMINISTROFAKOJ** 40

**LA IKUE-KONGRESO 2016 "NIA 69"**
La slovaka urbo Nitra gastigis nian ĉi-jaran kongreson 41

**KRISTANAJ E-ISTOJ DUM LA UK EN NITRA** 47
**BIBLIAJ TAGOJ 2017** 48

**Radio Vatikana**, 48

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**
**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>
**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>
**UEA-konto "ikue-v" * Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia
ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile
Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli **- Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

La festo de la 28-a de Junio en Vatikano por la pastra jubileo de la emerita Papo.

# 65-A PASTRIĜDATREVENO DE BENEDIKTO LA 16-a

## Francisko: "de li, multe da forto"

La 29-an de Junio 1951, en la soleno de sanktaj Petro kaj Paŭlo, la emerita Papo ricevis la pastran ordinon kune kun sia frato Georg kaj aliaj 42 kunfratuloj. Tiu granda festo ripetiĝis 65 jarojn poste en la Klementa Salono en Vatikano, kun la ĉirkaŭbrako de la du Papoj. Francisko memorigis, citante la vortojn de Benedikto la 16-a, ke la teologio estas "la serĉo de la amato": la decida afero en niaj tagoj – li klarigis – "estas, ke la Sinjoro estu vere ĉeestanta": "…ke ni deziras Lin, ke interne ni estas proksimaj al Li, ke ni amas Lin, ke vere ni profunde kredas je Li kaj kredante, ke ni vere amas Lin". Do, la unika afero vere decida estas "havi la rigardon kaj la koron direktitaj al Dio". La amema rigardo de Benedikto la 16-a – diris Francisko – estas direktita ankaŭ al la Eklezio: "Sankteco, vi daŭre servas la Eklezion, ne ĉesas kontribui vere kun energio kaj saĝeco al ĝia kresko; kaj vi faras tion ĉi en tiu malgranda Monaĥejo *Mater Ecclesiae* en Vatikano, kiu do aspektas tute alia afero, ol tiuj



*Jozef kaj Georg Ratzinger en la tago de ilia pastra ordino*

forgesitaj anguletoj, en kiujn la hodiaŭa kulturo de la forapartigo inklinas apartigi la personojn, kiam pro ilia aĝo iliaj fortoj malpliiĝas". "Tute la malo", deklaris Francisko: "Kaj permesu, ke tion diru nete via posteulo, kiu elektis la nomon Francisko. Ĉar la spirita itinero de sankta Francisko komenciĝis en San Damiano, sed la vera, amata loko, la pulsanta koro de la ordeno, kie li fondis ĝin kaj kie fine li redonis sian vivon al Dio estis la Porziuncola, la "eta porcio", la anguleto ĉe la Patrino de la Eklezio".

Papo Francisko daŭrigis sin turni al "kara kunfratulo" dirante: "La Providenco volis, ke vi,



atingu lokon propre, por tiel diri, 'franciskanan', el kiu fontas trankvilo, paco, forto, konfido, matureco, fido, sindediĉo kaj fideleco, kiuj faras al mi multe da bono kaj donas multe da forto al mi kaj al la tuta Eklezio. Kaj mi permesas diri ankaŭ: de vi venas ankaŭ sana kaj ĝoja humursento".


Papo Francisko eldiris fine specialan bondeziron: "La deziro, per kiu mi finas, estas tial bondeziro, kiun mi adresas al vi kaj samtempe al ĉiuj ni kaj al la tuta Eklezio: ke Via Sankteco povu daŭre senti la subtenantan manon de la mizerikorda Dio, ke vi povu sperti kaj atesti al ni la amon de Dio; ke kun Petro kaj Paŭlo vi povu daŭre plenĝoji, dum vi paŝas al la celo de la kredo" (kp 1Pet 1,8-9; 2 Tim 4,6-8).

Ευχαριστούμεν ("Euĥaristómen", dankesprimo). Ĉi tiu vorto en la greka, skribita sur sanktulbildeto de novpastro, ordinita antaŭ 65 jaroj kun Benedikto la 16-a, rememore pri la primica Meso, orientis la paroladon de la emerita Papo: "Per ĉi tiu vorto, laŭ ĝiaj multaj aspektoj, estas jam dirite ĉio, kion oni povas diri dum ĉi tiu momento. 'Ευχαριστούμεν' diras homan dankon, dankon al ĉiuj. Dankon ĉefe al vi, sankta Patro. Via boneco, ekde la unua momento de la elekto, en ajna momento de mia vivo ĉi tie, tuŝas min, vere subtenas min interne; pli ol la vatikanaj ĝardenoj kun ilia beleco, via boneco estas la loko, kie mi vivas kaj mi sentas min protektita". Daŭrigante eluzi la vorton "dankon", la emerita Papo fine esprimis deziron: "Ke ĝi estu mondo ne de morto, sed de vivo; mondo, en kiu la amo venkis la morton". ■

**Dum la ĝenerala aŭdienco de la 3-a de Aŭgusto 2016 Francisko retrairis la etapojn de sia ĵusa vojaĝo al Pollando (27-31/07/2016)**


# LA MJT: "SIGNO DE ESPERO EN LA FRATECO"

"Profeteca signo por Eŭropo kaj por la mondo". Papo Francisko tiel difinis la mondan junularan Tagon en Krakovo. Alparolante la fidelulojn ĉeestantajn dum la ĝenerala aŭdienco de la 3-a de Aŭgusto en Vatikano li diris: "La nova generacio de gejunuloj, heredantoj kaj daŭrigantoj de la pilgrimo, kiun startigis sankta Johano Paŭlo la 2-a, respondis al la defio de la hodiaŭo, ili donis signon de espero". Ĉi tiu signo, li substrekis, "nomiĝas frateco": "ĉar, ĝuste en ĉi tiu militanta mondo oni bezonas fratecon, proksimiĝon, dialogon, amikecon. La signo de la espero estas kiam estas frateco".



Francisko daŭrigis reliefigante la pretecon de la gejunuloj de MJT konstrui pontojn, esti kune, sperti la "ĝojon de la renkontiĝo" kaj, li emfazis, "ili denove formis mozaikon de frateco": "signifa bildo de la MJT-tago estas la multkolora maro da flagoj, kiujn flirtigis la junuloj: fakte, dum la MJT, la flagoj de la nacioj fariĝas pli belaj, por tiel diri "ili puriĝas", kaj ankaŭ flagoj de nacioj en konflikto inter si flirtas proksimaj. Kaj tio estas bele!".

En Krakovo, daŭrigis la Papo, la junuloj de la mondo "akceptis la mesaĝon de la Mizerikordo, por porti ĝin ĉien en la spiritaj kaj korpaj faroj". Sekvis la kortuŝa rememoro pri la juna romanino, kiu mortis pro meningito en Vieno, dum la revenvojaĝo el Krakovo: "Memoro plena je amo iras al Susanna, la roma knabino de tiu ĉi diocezo, kiu mortis en Vieno tuj post la partopreno en la MJT. Ke la Sinjoro, kiu certe akceptis ŝin en la Ĉielo, konsolu ŝian familion kaj amikojn".



*En la koncentrejo, silento kaj preĝado*

Francisko ne mankis reveni kun la memoro al aliaj ŝlosilaj momentoj de la apostola vojaĝo al Pollando, precipe al la vizito al la mariala Pilgrimloko Częstochowa kaj al la nazia koncentrejo Auschwitz-Birkenau. Antaŭ la ikono de Nia Sinjorino, li konfidis: "mi ricevis la donacon de la rigardo de la Patrino, kiu estas ĉefe la Patrino de la pola popolo". Li tiel emfazis la fidon de tiu nacio, fido, kiu subtenis la landon en tempo de granda suferado: "Pollando hodiaŭ memorigas al la tuta Eŭropo, ke ne povas esti estonteco por la kontinento sen ĝiaj fondantaj valoroj, kiuj siavice havas je la centro la kristanan konceptadon pri la homo. Inter ĉi tiuj valoroj estas la mizerikordo, kies specialaj apostoloj estis du grandaj filoj de Pollando: sankta Faustina Kowalska kaj sankta Johano Paŭlo la 2-a".



Fine, Francisko turnis sian penson al la kortuŝa vizito al Auschwitz-Birkenau. Vizito, li diris, "kies horizonto estis la mondo, mondo vokata respondi al la defio de la popeca milito, kiu ĝin minacas". Tie, li aldonis, "la granda silento de la vizito al Auschwitz-Birkenau estis pli elokventa ol ajna parolado": "en la silento mi aŭskultis, mi sentis la ĉeeston de ĉiuj animoj, kiuj pasis tie; mi sentis la kompaton, la mizerikordon de Dio, kiun iuj sanktaj animoj kapablis porti en tiun abismon. En tiu granda silento, mi preĝis por ĉiuj viktimoj de perforto kaj milito".

Tie, li diris, "mi komprenis pli ol iam la valoron de la memoro, ne nur kiel memoro de pasintaj eventoj, sed kiel admono kaj respondeco por hodiaŭ kaj morgaŭ, por ke la semo de malamo kaj perforto ne enradikiĝu en la sulkojn de la historio": "konsiderante tiun kruelecon, en tiu koncentrejo, mi tuj pensis al la kruelaĵoj de hodiaŭ, kiuj similas; ne tiom koncentritaj kiel en tiu loko, sed ĉie ĉeestantaj en la mondo, en ĉi tiu mondo, kiu malsanas je krueleco, doloro, milito, malamo, malĝojo. Kaj pro tio mi petas vian preĝon: ke la Sinjoro donu al ni la pacon!".

Francisko do dankis, en la itala kaj pola lingvoj, la multajn, kiuj sindevigis por la sukceso de la MJT kaj de la vizito al Pollando, ekde la landa prezidanto Andrzej Duda kaj kardinalo Stanisław Dziwisz. Nek li forgesis levi specialan preĝon por kardinalo Franciszek Macharski, kiu mortis tuj post la fino de la monda tago, kaj por la ĵurnalistino Anna Maria Jacobini, abrupte mortinta dum ŝi raportis el Krakovo. ■

## FORPASIS KARDINALO FRANCISZEK MACHARSKI
### Li benis la katolikajn esperantistojn

***Funebris la Eklezio de Krakovo pro la morto de sia emerita ĉefepiskopo, forpasinta la 2-an de Aŭgusto, 89-jaraĝa. Kvin tagojn antaŭe li ricevis la viziton de Papo Francisko: ĝi estis neantaŭvidita gesto, signo de la zorgemo de Francisko pri la kardinalo, kiu en 1978 fariĝis posteulo de Karol Wojtyła en la episkopa katedro de sankta Stanislao.***


*Forpasinta kardinalo Franciszek Macharski*

«Mi estas dankema al la Providenco, ĉar eblis al mi viziti lin dum la ĵusa vizito al Krakovo – skribis Papo Francisko en sia kondolenca telegramo al la nuna ĉefepiskopo de Krakovo kardinalo Stanisław Dziwisz, posteulo de Macharski. La lasta etapo de lia vivo estis suferoplena, kaj li akceptis ĝin kun spirita trankvilo. Ankaŭ en tiu elprovo li restis fidela atestanto de fido je la boneco kaj kompatemo de Dio. Li restos tiel en mia memoro kaj en la preĝoj. La Sinjoro akceptu lin en sian gloron». Kaj Bergoglio en sia telegramo ankaŭ memoris kiel la forpasinta kardinalo restis fidela dum sia tuta vivo al sia episkopa moto: Jesuo, mi fidas al Vi". Ne nur. "Li gvidis la Eklezion de Krakovo en la malfacila periodo de politikaj kaj sociaj transformoj – memoris Francisko, aludante la disfalon de la sovetia bloko kaj la finon de la komunista reĝimo en Pollando – per saĝo, per sana disiĝo el la realaĵo, zorgante pri la respekto de ĉiu persono por la bono de la eklezia komunumo, kaj ĉefe por konservi vivanta la fidon en la koroj de la homoj".

Kardinalo Macharski gvidis la Eklezion de Krakovo ĝis la 3-a de Junio 2005, iom pli ol du monatojn post la morto de Johano Paŭlo la 2-a, kiu kreis lin kardinalo dum la Konsistorio de la 30-a de Junio 1979. Franciszek Macharski naskiĝis la 20-an de Majo 1927 en Krakovo kaj li ricevis la pastran ordinon de la kardinalo, tiama ĉefepiskopo de Krakovo, Adam Sapieha, la 2-an de Aprilo 1950. Ses jarojn daŭris lia komenca paŝtista agado kiel vikario en la malgranda paroko de Kozy, Bielsko-Biała. En 1956 li vizitis la Katolikan Universitaton de Friburgo, Svislando, por kompletigi siajn teologiajn studojn, kun doktoriĝo en 1960 pri paŝtista teologio. Li revenis al Krakovo, kie li fariĝis spirita direktoro de la Seminario kaj instruisto pri paŝtista teologio ĉe la Papa teologia fakultato. Dek jarojn poste, en 1970, la nova ĉefepiskopo kardinalo Wojtyła nomumis lin rektoro de la Seminario, kaj en 1977 kanoniko de la Metropola Kapitulo de la Katedralo de Wawel. La 29-an de Decembro 1978 Karol Wojtyła, ele-

ktita Papo kelkajn monatojn antaŭe, elektis lin kiel sian posteulon en la katedro de sankta Stanislao. Lia episkopa servado ĉiam estis rilatpunkto por la tuta pola socio, kapabla realigi altnivelajn intervenojn per simpla kaj rekta stilo. Specialan ligitecon kun Johano Paŭlo la 2-a li ĉiam konservis, akceptante lin eĉ 8 fojojn en Krakovo, inter 1979 kaj 2002.

**Kontaktoj kun la katolikaj esperantistoj**

Pluraj estis la momentoj, kiam kard. Macharski elmontris sian paŝtistan proksimecon al la katolika E-movado, precipe al tiu krakova, vigla grupo animata de la senlaca agado de nia neforgesebla fratino Franciszka Bardecka. En 1983 li sendis dankan leteron (en itala lingvo) al Sac. Duilio Magnani, rilate la konatan iniciaton «Pakaĵoj al Pollando» (kolekto kaj alsendo de vivrimedoj al Pollando, kiu tiam travivis gravegan krizon) aldonante «koran benon por via animzorga agado». La 10-an de Marto 1985, antaŭ la kutima S. Meso en Esperanto en la kapelo de la paroĥa preĝejo honore al S. Stefano en Krakovo (Pollando), kard. Macharski vizitis la katolikajn Esperantistojn kune kun kuria kaj paroĥa asistantaro. En salutmesaĝo, la Kardinalo alte aprezis la celon kaj agadon de la internacia lingvo; ĉeokaze, li esprimis la timon, ke malnobluloj uzu profite al siaj celoj tian noblan movadon, kia estas Esperanto. Okaze de la tradicia «Preĝtago» en Ĉenstoĥovo de 1985 li sendis salutan leteron. En tiu sama jaro pastro Duilio Magnani denove veturis al Pollando per kamiono plena je donacaj varoj. Kun fratino Franciszka Bardecka li estis akceptita en aŭdienco 4.3.1985, de kard. Macharski. ■

## ALVOKO AL PACO – Asizo 2016

***Kun la partopreno de Papo Francisko ariĝis en Asizo la 20-an de Septembro pli ol 500 religiaj estroj de la mondo por preĝi por la paco, kulmine de la renkontiĝo aranĝita de la Komunumo de sankta Eĝidijo, de la diocezo kaj de la franciskanaj familioj, pri la temo: "Soifo je paco: religioj kaj kulturoj en dialogo". Je la fino oni lanĉis ĉi tiun alvokon.***

Viroj kaj virinoj el diversaj religioj, ni kunvenis, kiel pilgrimantoj, en la urbo de sankta Francisko. Ĉi tie, en 1986, antaŭ tridek jaroj, laŭ invito de Papo Johano Paŭlo la 2-a, kunvenis religiaj reprezentantoj el la tuta mondo, por la unua fojo en maniero tiel kunpartoprenita kaj solena, por aserti la nedisigeblan ligon inter la granda bono de paco kaj iu aŭtentika religia sinteno. De tiu historia evento, ekiris longa pilgrimado kiu, tuŝante multajn urbojn de la mondo, implikis multenombrajn kredantojn en la dialogon kaj en la preĝon por la paco; ĝi kunigis sen konfuzi, estigante fortikajn interreligiajn amikecojn kaj kontribuante je la estingo de nemalmultaj konfliktoj. Ĉi tiu estas la spirito kiu animas nin: realigi la renkonton en la dialogo, kontraŭstari ĉian formon de perforto kaj misuzo de religio por pravigi militon kaj terorismon. Kaj tamen, en pasintaj jaroj, ankoraŭ multaj popoloj estis dolorige vunditaj de milito. Ne ĉiam oni komprenis, ke milito plimalbonigas la mondon, postlasante heredaĵon de doloroj kaj de malamoj. Ĉiuj, per milito, estas malgajnantoj, ankaŭ la gajnantoj.

Ni adresis nian preĝon al Dio, por ke Li donu pacon al la mondo. Ni rekonu la neceson preĝi konstante por la paco, ĉar la preĝo protektas la mondon kaj prilumas ĝin. Paco estas la nomo de Dio. Kiu vokas la nomon de Dio por pravigi terorismon, perforton kaj militon, ne iras laŭ Lia vojo: milito en la nomo de la religio fariĝas milito kontraŭ la religio mem. Kun firma konvinkiĝo, ni do ripetas, ke perforto kaj terorismo opozicias al la vera religia spirito.




Ni metis nin je la aŭskulto de la voĉo de la malriĉuloj, de la infanoj, de la junaj generacioj, de la virinoj kaj de tiom multaj fratoj kaj fratinoj, kiuj suferas pro milito; kun ili ni diras kun forto: Ne al la milito! Ne restu neaŭskultata la krio de doloro de multaj senkulpuloj. Ni petegas la respondulojn de la Nacioj por ke estu malaktivigataj la movantaj kaŭzoj de la militoj: la avido

je povo kaj mono, la avidego de la komercistoj de armiloj, la partiecaj interesoj, la venĝoj pro la pasinteco. Pliiĝu la konkreta sindevigo por forigi la kaŭzojn kiuj staras sub la konfliktoj: la situacioj de malriĉeco, maljusteco kaj malegaleco, la ekspluato kaj la malŝato de la homa vivo.

Fine malfermiĝu nova tempo, en kiu la mondo iĝinta tutaĵo fariĝu familio el popoloj. Oni efektivigu la respondecon konstrui veran pacon, kiu estu atenta al la aŭtentikaj bezonoj de la personoj kaj de la popoloj, kiu preventu la konfliktojn per kunlaboro, kiu venku la malamojn kaj superu la barilojn per la renkonto kaj la dialogo. Nenio estas perdita, se oni efektive praktikas la dialogon. Nenio estas neebla, se ni turnas nin al Dio en la preĝado. Ĉiuj povas esti farantoj de paco; el Asizo ni renovigas kun konvinkiĝo nian sindevigon esti tiaj, per la helpo de Dio, kune kun ĉiuj bonavolaj viroj kaj virinoj. ■

*Asizo, la 20-an de Septembro 2016*
*(neoficiala traduko de Antonio De Salvo)*

## 40 JAROJN EN ESPERANTO

En la nokto inter la 17-a kaj la 18-a de Aprilo 1976 (ĉirkaŭ je la dua, do jam la 18-an) surondiĝis unuafoje tekstoj en Esperanto de Radio Vatikana: estis ĵus pasinta la Sankta Sabato, kaj estis jam Pasko de antaŭ 40 jaroj. El la voĉoj de Erzsebet Reményi Puracchio (hungarino edziniĝinta al italo) kaj de la dominikana Patro Giacinto Jacobitti oni aŭdis la komencon de Psalmo 8: «Ho Eternulo, nia Sinjoro, kiel majesta estas Via nomo sur la tuta tero!» kaj tuj poste la komencon de Psalmo 19 (18): «La ĉieloj rakontas la gloron de Dio, kaj la farojn de Liaj manoj raportas la ĉiela firmaĵo. Tago al tago transdonas diron, kaj nokto al nokto faras sciigon. Sen parolo kaj sen vortoj; oni ne aŭdas ilian voĉon. Tra la tuta mondo iras ilia ordono, kaj ĝis la fino de la universo iras iliaj vortoj».

La estiĝo de regula elsendado en Esperanto, kiun oni komencis la 2-an de Januaro 1977 post la menciitaj eksperimentaj, noktaj aŭdigoj de religiaj tekstoj, estis tre komplika. La decida puŝo venis de peticio, subskribita de centoj da partoprenantoj en la Universala Kongreso de Ateno (en Julio 1976) kun ĉekape la tiama katolika Ĉefepiskopo de tiu urbo, Nikólaos Foscolos, kiu konvinkis Papon Paŭlon la 6-an rajtigi la uzon de Esperanto. Rakontos la unua redaktoro, Patro Giacinto Jacobitti: «Oni telefonis al mi el la Radio kaj oni diris, ke oni volas paroli kun mi». Ĝi estis la longe atendita informo: la Sankta Seĝo malavare disponigis la "antenan spacon" (nome, la teknikan parton), dum la administraj elspezoj estas je kosto de IKUE.

En ĉi tiuj 40 jaroj, viciĝis ĉe la mikrofono pluraj esperantistoj, inter kiuj ni aparte memorigas Pastron Battista Cadei, Patron Carlo Musazzi kaj (de 1981) Carlo Sarandrea. Pasintjare, la 1-an de Februaro, surondiĝis la elsendo numero 5000.

Gravas ripeti la inviton aŭskulti kaj skribi al la redakcio (SCV-00120 Città del Vaticano; esperanto@vatiradio.va). La estonteco de la elsendo dependas, ja, de kiom ĝi estas sekvata, kaj ankaŭ IKUE bezonas koni, ĉu valoras daŭrigi. Fakte, la administraj elspezoj je kosto de IKUE, kvankam ne altegaj (pro la karaktero esence volontula de la kunlaboro de la esperantistoj), estas tamen ne bagatela pezo por asocio, kiu baziĝas nur sur kotizoj kaj mondonacoj.




Oni ne devas krome forgesi la homan pezon de tiuj, kiuj de 40 jaroj dediĉas sian tempon al ĉi tiu agado kun sindevigoj fiksaj kaj nepraj (ankaŭ, eĉ precipe dum festotagoj): estas tre pli facile trovi iun, kiu elpaŝu per manifestiĝoj unufojaj kaj ekstere videblaj (kaj plezurigaj, pro la famkonateco, kiun ili havigas), ol trovi iun, kiu dum 40 jaroj certigu tagon post tago daŭran agadon "malantaŭ la kulisoj". ■

*Antonio De Salvo (el la reto,*
*kun redakciaj aldonoj).*

## Pastro Federico Lombardi forlasis Radion Vatikanan



La ĝenerala direktoro de Radio Vatikana, Pastro Federico Lombardi, finis sian servon post 26 jaroj: li alvenis en 1990 por esti direktoro de la programoj kaj de 2005 li estis ĝenerala direktoro. Ekde marto lin anstataŭigas la portempa direktoro d-ro Giacomo Ghisani "por la prizorgo de la ordinara administrado en la kunteksto de la nuna restrukturado de ĉiuj vatikanaj amaskomunikiloj". Ĉi-lastaj estos unuigitaj en novan fakon, la Papa Konsilio por la sociaj komunikadoj, al kiu referencos ĉiujn komunik-servojn de Vatikano (televida centro, ĵurnalo, gazetara salono ktp). Ni levas dankeman penson al Pastro Lombardi, kiu ĉiam montris simpation por nia lingvo: interalie, paske kaj Kristnaske li ĉiam bondeziris en la internacia lingvo al la redaktoro de la E-elsendo de la Radio. ■

## Novaj ekleziaj administrofakoj

Per apostola letero datita la 15-an de Aŭgusto kaj per samdata *motu proprio* (meminiciata dekreto) Papo Francisko aranĝis la kunfluigon de pluraj papaj konsilioj en du novajn administrofakojn. "Temas pri konformigo de la fakoj de la roma Kurio – skribis la Papo – al la situacioj de nia epoko, adaptante ilin je la bezonoj de la universala Eklezio".

La nova administrofako "por la laikoj, la familio kaj la vivo", funkcianta ekde la unua de Septembro, alprenis la kompetentecojn kaj funkciojn de la malfonditaj Konsilioj por la familio kaj por la laikoj. Ĝi celas proponi subtenon kaj helpon al la laikoj, la familio kaj la vivo "por ke ili estu aktiva atesto pri la Evangelio en nia epoko kaj esprimo de la boneco de la Elaĉetanto". Kard. Kevin Joseph Farrell, naskita en Dublino, Irlando, la 2-an de Septembro 1947, iama episkopo de Dallas, Usono, estas la unua prefekto de la administrofako.

Ekde la venonta jarkomenco 4 papaj Konsilioj: Justeco kaj paco, *Cor Unum*, paŝtista agado ĉe migrantoj, ĉe sanitaruloj kunfluos en la novan administrofakon "por la servo al la kompleta homa evoluo". La Papo nomumis prefekto de la fako kardinalon Peter Kodwo Appiah Turkson, naskita en Wassaw Nsuta, Ganao, la 11-an Oktobro 1948, lasta prezidanto de la papa Konsilio Justeco kaj Paco. Unu el la sekcioj specife okupiĝos pri rifuĝintoj kaj migrantoj kaj ĝi estas portempe gvidata rekte de la Papo, por esprimi lian apartan zorgemon pri ilia situacio. "En ĝia tuta esto kaj agado – skribas la Papo en la *motu proprio* – la Eklezio estas vokata por akceli la tutecan evoluon de la homo sub la lumo de la Evangelio. Tiu evoluo realiĝas pere de la prizorgo de la senmezuraj havaĵoj de justeco, paco kaj savogardo de la kreaĵaro". La nova fako "aparte kompetentos pri la temoj, kiuj koncernas la migradojn, la bezonantojn, la malsanulojn kaj la ekskluditojn, la marĝenitojn kaj la viktimojn de armitaj konfliktoj kaj naturaj katastrofoj, la malliberulojn, la senlaborulojn kaj la viktimojn de ajna formo de sklaveco kaj torturo kaj aliajn personojn kies digno estas en risko". Ĝi ankaŭ okupiĝos pri la homaj rajtoj, aparte pri tiuj koncerne la laboron inkluzive de tiu de la neplenkreskuloj, pri la komercado de homaj vivoj, pri mortopuno kaj malarmado. ■

*cs*

*Ĉu EK malfruas? Ĉerpu amason da kurantaj informoj kune kun preĝoj, tekstoj, bildoj k.s. el la Fejsbuka paĝo de IKUE. En www.ikue.org alklaku la simbolon de Fejsbuko alte, dekstre.*

# LA SLOVAKIA URBO NITRA IĜIS LA ĈEFURBO DE ESPERANTUJO EN LA JARO 2016

***La urbo Nitra en Slovakio allogis atenton ne nur de la lokaj loĝantoj, sed de la tuta Slovakio kaj la tutmonda esperantistaro, ĉar julie en ĝi okazis du gravaj kongresoj. De la 16-a ĝis la 23-a en ĝi okazis la 69-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, kaj poste, de la 23-a ĝis la 30-a, la 101-a Universala Kongreso de Esperanto.***

Tiuj katolikaj esperantistoj, kiuj, ne nur pro financa kaŭzo, ne povis partopreni ambaŭ kongresojn, preferis partopreni la 69-an kongreson de IKUE, do la kongreson de la katolikaj esperantistoj. Ĉeestis ĉirkaŭ kvindeko da gefratoj el Belgio, Ĉeĥio, Germanio, Francio, Hungario, Italio, Kroatio, Litovio, Nederlando, Pollando, Slovakio, Svislando kaj Ukrainio. Inter ili ĉeestis du pastroj – la grekkatolika pastro Serhij Prudko el Ukrainio kaj la romkatolika pastro Maryus Dyglys el Litovio. La ĉefarangantoj de la kongreso estis fratino Marija Belošević el Kroatio – la vicprezidantino de IKUE kaj frato Pavol Petrík el Slovakio. Al ili apartenas dankego pro la preparo kaj organizado de la kongreso.



*La porpastra seminario de s-ta Gorazd en Nitra*

La kongreso okazis en la Porpastra Seminario de Sankta Gorazd en Nitra. La ĉefa temo de la kongreso estis: ***Vizaĝo de Mizerikordo***.



*Prelegas Franz-Georg Rössler kun sia edzino Rita*



*Sabatan s. meson celebras Sac. Serhij Prudko*

Sabaton la 16-an de Julio posttagmeze alvenis la plejparto de la kongresanoj. Post ilia loĝigo okazis en la seminaria kapelo rozaria preĝo kaj post ĝi sankta meso, kiun en latinkatolika rito celebris la sacerdoto Serhij Prudko el Ukrainio. Sekvis vespermanĝo kaj post ĝi la interkona vespero.



*Inaŭgura alparolo de prezid. Giovanni Daminelli*

Dimanĉon post la matenmanĝo kaj matena preĝo okazis la inaŭguro de la kongreso. Poste sekvis du prelegoj. La unua prelego estis de Sac. Serhij Prudko: *Sep agoj de la mizerikordo por animo kaj sep agoj de mizerikordo por korpo*. La dua prelego estis de Franz-Georg Rössler el Germanio: *Salve Regina, patrino de la mizerikordo. Pri la laŭdo de la Dipatrino tra mil jaroj*, akompanata per bildoj, informoj kaj muziko. Post la Anĝeluso kaj tagmanĝo okazis trarigardo de la kastela areo – la fortikaĵo de la kastelo, la kate-

dralo de la sankta Emeramo kun trairo de la Pordo de Mizerikordo, la romanika preĝejeto de s-ta Emeramo kaj la Dioceza muzeo. Antaŭvespere post rozaria preĝo en la seminaria kapelo la kongresanoj foriris al la proksima paroĥa preĝejo de s-taj Petro kaj Paŭlo, kie okazis la sankta meso kune kun paroĥanoj. Kuncelebranto estis pastro



*Ĉefarangantino de la kongreso Marija Belošević*

Serhij Prudko. La duan legaĵon esperantlingve legis Miloslav Šváček kaj Pavol Petrík lerte tradukis esperantlingven la slovaklingvan homilion. Post la vespermanĝo frato Šváček prezentis laŭdezire de la kongresanoj projekciaĵojn pri la 63-a Kongreso de IKUE okazinta en la jaro 2010 en Parizo kaj pri la 63-a Kongreso de IKUE okazinta en Pécs, Hungario, 2012.



*En la katedralo de sankta Emeramo*

Lundon okazis tuttaga perbusa vojaĝo. Kiel unua celo estis pilgrimo al la grava slovakia pilgrimloko Marianka apud Bratislava. Post la eniro tra la Pordo de la Mizerikordo en la preĝejo de la Naskiĝo de Virgulino Maria okazis tie esperantlingva meso kaj post ĝi la renovigo de la sinkonsekro al la Senmakula Koro de Maria. Post trarigardo de la pilgrimloka areo okazis vizito de la slovakia ĉefurbo Bratislava, kie la IKUE-kongresanoj renkontiĝis kun la kongresanoj de KELI (Kristana Esperantisla Ligo Internacia), kiuj okazigis sian kongreson en la ĉefurbo. Post perpieda trarigardo de la gravaj vidindaĵoj de Bratislava, precipe de ĝiaj sanktejoj kun la Pordo de la



*La partoprenantoj de la 69-a kongreso de IKUE sur la katedrala placo de Johano Paŭlo la 2-a en Nitra*



*Kune kun KELI-kongresanoj en la Evangeliana Teologia Fakultato en Bratislava*

Mizerikordo, okazis ankoraŭ ĝia trarigardo ankaŭ pere de turisma trajneto. Poste la busoj translokigis nin al la Evangeliana Teologia Fakultato, kie okazis komuna vespermanĝo kaj belega folklora vespero. Post komuna preĝo ni revenis al Nitra. Mardon post la matena preĝo kaj matenmanĝo okazis pluaj prelegoj. Frato Pavol Petrík prelegis pri *Sanktuloj ligitaj kun Nitra*. Post li prelegis frato Stanisław Śmigielski el Pollando pri *Postmortaj aventuroj de Andreo Bobola, la patrono de Pollando, kiu estis maltrankvila dumvive, kaj post sia morto li maltrankviligas aliulojn*. Sekvis prelego de D-ro Štefan Grenda pri *La civilizado de la amo kaj la morto, nun en la mondo*. Kaj fine prelegon de la neĉeestanta sac. Pierluigi Svaldi pri *La historio de la Jubileo* legis frato D-ro Giovanni Daminelli. Post la prelegoj okazis en la seminaria kapelo la sankta meso.



*Prelegas Stanisław Śmigielski el Pollando*



*Prelegas Pavol Petrík pri la sanktuloj de Nitra*

Post la Anĝeluso kaj tagmanĝo okazis perpieda vizito de la Kalvario en Nitra. Post vizito de la tiea Misiista Muzeo, tiuj, kiuj ankoraŭ kuraĝis supreniri, preĝis kaj meditis ĉe la apartaj 14 stacioj la suferojn de la krucvojo de Jesuo. Supre sub la tri krucoj okazis komuna fotografado (vidu la frontpaĝon). Poste okazis libera posttagmezo kaj vespero.



*Preleganto D-ro Štefan Grenda el Slovakio*



*Prelegas Bernhard Schweiger el Germanio*

Merkredon daŭrigis la prelegado. Kiel unua prelegis sac. Serhij Prudko pri Ukrainio. Sekvis prelego de Marija Belošević pri *Sankta Leopold Bogdan Mandić, patrono de la Jaro de Mizerikordo*. Post ŝi prelegis frato Bernhard Schweiger pri *E-radioelsendo el Erfurto*. Kaj laste prezentis la traduklaboron fratino Nathalie Kesler.



*Alparolo de Nathalie Kesler el Francio*

Post la Anĝeluso okazis forveturo al la urbo Trnava, en kiu troviĝas 11 romkatolikaj preĝejoj. Ĉefa celo de la tiea vizito estis la katedralo de sankta Johano Baptisto, en kiu okazis esperantlingva meso, kiun kuncelebris pastroj Maryus Dyglys kaj Serhij Prudko. La legaĵon legis fratino Nathalie Kesler el Parizo. Kompreneble enirante la katedralon oni ankaŭ trairis la Pordon de la Mizerikordo. Post komuna fotografado okazis libervola trarigardo de la urbaj vidindaĵoj, precipe de kelkaj pluaj preĝejoj kaj de la bela kaj trankvila urba promenejo. Vesperiĝis kaj do estis necese reveni al Nitra.



*Prelegas sac. Maryus Dyglys el Litovio*

Ĵaŭdon kiel ĉiutage unue okazis matena preĝo kaj post ĝi matenmanĝo. Sekvis kunsido



*Post la sankta meso en la katedralo de Johano Baptisto en Trnava*

de IKUE-anoj, por pritrakti aktualaĵojn de la nuntempa situacio de IKUE. Poste ni foriris al vizito de la urba sinagogo el la jaro 1911, kiu estas unu el la plej malnovaj sinagogoj en Slovakio. Ĝi nuntempe funkcias kiel koncertejo kaj por ekspozicioj. Tiutempe lige kun la Universala Kongreso en ĝi ankaŭ estis ekspozicio pri Esperanto.

Post la tagmanĝo kaj rozaria preĝo sekvis daŭrigo de la prelegoj. Estis prezentita prelego de Vitor Luiz Rigoto dos Anjos pri *Praktikado de la Faroj de Korpa Mizerikordo en Brazilo*. Poste prelegis frato Krešimir Belošević pri *Kantilenaj maŝinoj preĝas*. Kaj la prelegon de la neĉeestanta fratino Norma Cescotti pri *Indulgenco de la Porziuncola* legis frato Giovanni Daminelli.



*Prelegas frato Krešimir Belošević el Kroatio*

La tri ĉeĥaj kongresanoj Marie Klumparová, Alois Klumpar kaj Miloslav Šváček renkontiĝis kun frato Stano Kudlačák, loĝanto de Nitra, laboranta kiel profesoro en Katolika Gimnazio de Sanktaj Cirilo kaj Metodio en Nitra, kiu partoprenis la katolikajn tendarojn okazintajn en Herbortice, Ĉeĥio, kiuj estis perforte likviditaj en la jaro 1977 fare de fifama komunista polico StB. Ekestis ideo eluzi la posttagmezan liberan tempon kaj parton de la prelega tempo por viziti la proksiman monton Zobor. La supreniro sur la pado kun interesa kaj nekutima kalvaria vojo, kaverna fonteto, kaj ŝtonoza arbara deklivo ŝajnis ne esti tro laciga eĉ spite de la suna vetero. Ho, kiel belega elrigardo al la tuta urbo Nitra kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas desupre. Post ĝuo de tiu ĉi raviga travivaĵo estis necese malsupreniri, kio estis multe pli malfacila ol la supreniro. Eĉ tion ni finfine sukcesis ĝojante, ke por ni ne plu estas nekonata tiu monta supro kun la turo. Post la reveno ni sukcesis ĉeesti la prelegan parton kaj post ĝi la sanktan meson en la seminaria kapelo.



*Ekstendaranoj Marie Klumparová, Alois Klumpar, Stano Kudlačák antaŭ vizito de Zobor*

Post la vespermanĝo atendis nin unue trarigardo de la paroĥa preĝejo de sanktaj Petro kaj Paŭlo, en kiu poste okazis impona orgenkoncerto de frato Stefan Lepping, estrarano de IKUE. La koncerto titolis: *Mizerikordo: homiĝinta – gloriĝinta. Improvizoj pri dek internaciaj kristanaj kantoj*.



*Orgenkoncerto de frato Stefan Lepping*

Kaj vendredon okazis plua prelega parto.



*Muzika Matineo de Johannes Moser el Germanio*

La unua prelegantino estis fratino Rita Rössler-Buckel. Ŝi prelegis pri *25 jaroj de Laborunuiĝo de la katolikaj esperantistoj en la diocezo Speyer* kun bildoj, dokumentoj kaj informoj. Post ŝi prelegis pri *La Jakoba Vojo en*

*Litovio* pastro Maryus Dyglys. Kaj fine sekvis *Muzika matineo* de frato Johannes Moser.

Post Anĝeluso, tagmanĝo kaj rozario ankoraŭ okazis du lastaj prelegaj programeroj. Frato Bernhard Schweiger prezentis la libron *"Esperanto laŭ rekta metodo"* en la latina lingvo. Kaj fine Marija Belošević parolis pri la iniciato "*Kune por Eŭropo"*.

Sekvis dankmeso en la preĝejo de s-taj Petro kaj Paŭlo. Jes, volonte kaj kun ĝojo ni dankis al



*Ludas geedzoj Rössler, kantas Christine Karbe*

la ĉiela Patro pro la multnombraj benoj kaj gracoj ricevitaj dum la kongresa semajno. Ankaŭ al nia ĉiela Panjo flugis niaj dankoj per la kantpreĝo Salve Reĝina, pro ŝia ŝirmado, ĉar la tuta kongresa semajno pasis sub ŝia ŝirmo sen iu ajn sanaŭ aliaj problemoj.

La planita prelego de la prezidantino de ILEI (Internacia Ligo de esperantistaj instruistoj) Mirejo Grosjean pri *Preĝejoj de Armenio* pro malfruigo de ŝia planita alveturo (al UK) okazis nur post la vespermanĝo antaŭ la programo de adiaŭa vespero.

La preparita programo de la adiaŭa vespero okazis tute aliel, ol estis planite. Al la kongresejo venis kvindekpersona grupo de junulinoj el Meksikio, kiuj estis survoje al la Monda Junu-



*Prelegas prezidantino de ILEI Mirejo Grosjean*

lara Tago okazonta en Krakovo – al la renkontiĝo kun Papo Francisko. Ilia ĉeesto kaj kontribuo al la vespera programo ĝin igis tre interesa kaj



*Kantas grupo de meksikaninoj*

agrabla. Al la gaja vespera medio, kiu daŭris ĝis la noktomezo, grandparte ankaŭ kontribuis frato Inĝ. František Havlík el Ĉeĥio, kiu regalis la ĉeestantojn per bongusta vino devenanta el lia propra vinberejo kun vinkelo. Dankon, kara frato Francisko!Alvenis sabato, la adiaŭa tago de la kongreso. Post lasta sankta meso okazinta en la seminaria kapelo, matenmanĝo kaj konkludaj



*Frato prezidanto de IKUE Giovanni informas junulinojn pri Esperanto kaj IKUE*

interparoloj estis la kongreso definitive fermita.

Sincere dirite, la kongresa semajno en Nitra estis tre bela, agrabla kaj spirite riĉa travivaĵo. Post tutkoraj dankoj al Dio pro la benitaj travivaĵoj kaj post la dankoj al la Virgulino Maria, pro ŝia patrineca ŝirmado de la kongresanoj, estas necese ankaŭ danki al la ĉefarangantoj de la kongreso – fratino Marija Belošević kaj frato Pavol Petrík kaj al ĉiuj, kiuj iel ajn kontribuis al ĝia sukcesa okazigo. Koran dankon al la pastroj Serhij kaj Maryus pro la mescelebradoj, kiuj ja estis la plej valoraj okazaĵoj de la tuta kongreso. Sen la ĉiutagaj sanktaj mesoj la kongreso de la katolikaj esperantistoj estus neimagebla, preskaŭ



*Ke ne ekmanku vino kiel en Kana, tion garantiis el propra produkto frato František Havlík, Ĉeĥio*

senvalora. Ankaŭ dankojn meritas ĉiuj prelegintoj.

Dio benu vin, karaj kongresantaj gefratoj, kaj espereble, laŭ la volo de Dio, ĝis la revido en estonta kongreso de IKUE! ■

*Miloslav Šváček*



*Por adiaŭo kantas frato Bernard Meslin el Francio kaj Franz-Georg Rössler el Germanio*

## ĈEESTO DE KRISTANAJ ESPERANTISTOJ DUM LA UK EN NITRA 23-30/07/2016

Jam la unuan tagon IKUE havis sufiĉe bonan prezenton ĉe la Movada foiro. La kantado dank' al Stefan Lepping venigis plurajn. Dimanĉe la preĝejo estis plena okaze de la Ekumena diservo. Same por la posta sankta Meso en Esperanto. Sukcesa estis la komuna kunsido de IKUE kaj KELI marde matene. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de KELI, Philippe Cousson. Krom la prezento de la ĝisnuna agado de IKUE kaj KELI, Philippe koncize prezentis la ekumenan agadon de la esperantistoj.

La vicprezidantino de IKUE Marija Belošević ankaŭ informis pri la partopreno de IKUE en la kristana ekumena evento "Kune por Eŭropo" (Munkeno, 30-an de Junio/2-an de Julio). Dank' al teknikaj kondiĉoj, eblis prezenti plurajn retpaĝojn de IKUE kaj KELI, Facebook de IKUE, kaj aliaj kristanaj paĝoj (Fontoj, Breviero). Oni ankaŭ prezentis la gazetojn kaj preleg-kolektojn de IKUE.

La horaro de la ekumena diservo, dimanĉa meso kaj dumsemajnaj Mesoj aperis i.a. en la unua numero de la kongresa kuriero. Bedaŭrinde, malgraŭ, ke tio estis planite, la Mesoj ne okazis dum la tuta UK-semajno. ■

*Raportis Marija Belošević*




## Bibliaj Tagoj 2017 en Wittenberg, la urbo de Lutero de 1-a ĝis 5-a de Februaro 2017

**Kunvenejo:** Jugendherberge Wittenberg, Schlossstr. 14/15, D-06886 Lutherstadt Wittenberg http://www.jugendherberge-wittenberg.de

**Situo:** en la urbocentro apud Schlosskirche, 200 m de la urbocentra stacidomo

**Organizanto:** Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanujo r.a., Wolfram Rohloff, Am Marktplatz 82, D-09496 Marienberg, Germanujo <keli.prezidanto@web.de>



**Partoprenkotizoj:** la prezo por tranoktado kaj 3 manĝoj tage en plurlita ĉambro (3-7 litoj), kotizoj por eniroj, gvidadoj kaj trajna ekskurso al Leipzig estas 175 € por ĉiu persono. Kiu venas el eksterlando, ricevas rabaton de 40 €. Krompago por dulita ĉambro: (haveblas nur malmultaj): 26 €.

**Programo:** Biblia rondo pri la letero de la apostolo Paŭlo al la Galatoj, komuna kantado, gvidata vizito de la urbo Wittenberg, de la domo de Melanchthon, de la kastela preĝejo. Ekskurso al Leipzig kaj partopreno en moteta diservo kun la fama ĥoro de la Tomasianoj.

**Muzika organizanto:** Stefan Lepping.

**Demandojn pri la programo** direktu al Wolfram Rohloff.

**Kondiĉoj de aliĝo:** Via aliĝo validas post la alveno de via antaŭpago de 30 € por ĉiu persono kaj estos konfirmata post ricevo.

**Demandojn pri aliĝoj kaj financoj direktu al la trezoristo de la Bibliaj Tagoj:** Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-48356 Nordwalde, tel. 0049 2573 / 626 kaj 0049 151 5133 6794 <fischru@uni-muenster.de>

**Aliĝilo:** http://www.ikue.org/bibliajtagoj/2017.html ■

## RADIO VATIKANA - ELSENDOJ EN ESPERANTO

La elsendoj okazas trifoje semajne, en la sama horo 21:20 MET (19:20 UTC). **DIMANĈE** kun daŭro 8-minuta kaj **MERKREDE KAJ ĴAŬDE** kun daŭro 9-minuta.

**Por aŭskulti ilin per la Interreto:**

**Rekte je la indikita horo:** http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/diretta.asp

**Laŭpete:** http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp

**Arkivo:** http://www.radio-vatikana-esperanto.org

**Skribu al: RADIO VATIKANA - ESPERANTO, SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO**
**Ret-poŝto:** <esperanto@vatiradio.va>
Por ricevi retpoŝte la informilon de RV, petu abonon al: <promo@vatiradio.va>